

Mi renkontis Philippe Cullus



En junio 2024, mi havis la ŝancon renkonti Philippe Cullus. Verŝajne la plej malnova (kaj ja maljuna, 95 mi kredas) esperantisto de Bruselo.

Mi ne vere konis lin antaŭe, tamen jam konis tri de liaj infanoj, ĉar mi estis skolto kun du de ili, dum la 3a, foje, kuiris dum niaj tendumadoj. Kiam mi eklernis esperanton en 1980, mi eksciis ke ili estis el esperanto-familio, kaj ke ili regule uzis Pasportan Servon dum iliaj ferioj.

Philippe deziris fordoni parton de sia biblioteko, ĉefe revuojn, foje tre malnovajn.

Mi kolektis ilin kaj transdonis ilin al IEspA, la Internacia Esperanto Arkivo, kiu ĝojis ricevi tiun stokon. (*vidu sube*)

Mi profitis la okazon por pli bone koni Philippe, kaj demandi pri lia trajekto en Esperanto.

Li volonte respondis miajn demandojn, kaj permesis ke mi aperigu lian rakonton en nia revuo. Ĉiam tro okupata mi prokrastis dum monatoj, sed jen finfine tiu rakonto.

En 1943, tiam studento, li eklernis Esperanton kun amiko same studento. Memoru ke Hitler verkis kontraŭ Esperanto, kaj malpermesis ĝin, do jam estis sufiĉe aŭdace eklerni ĝin dum la milito!

En la sekvaj monatoj kaj jaroj, li eĉ vendis ekzemplerojn de la broŝuro *Esperanto en 10 leĝons* al pluraj aliaj studentoj. Okazis ke unu el ili estis... Emile Van Damme, estonte grava prezidanto kaj instruisto de nia klubo !

Li korespondis en Esperanto ekde 1944. Dum la okupanto permesis nur 4 lingvojn de korespondado. Kompreneble Esperanto ne estis unu el la 4 permesitaj lingvoj !

Baldaŭ li iĝis peranto de TJO, la Tutmonda Junular-Organizo.

Ne, ne estas tajperaro : TJO iĝos TEJO nur en 1952.

Li partoprenis la IJK-on de 1950 en Konstanz. Tien li vojaĝis kun Claude Piron.

Tamen li ne partoprenis aliajn kongresojn, ĉar lia familio rapide kreskis.

Profesie li estis unue instruisto. Sed dum li laboris, li plu studis por iĝi profesoro de mezlernejo. Kompreneble tiu duobla vivo devigis lin redukti siajn esperanto-aktivecojn.

Kaj simile pli poste, li rekomencis studi, ĉi foje por iĝi profesoro de Historio.

De tiam li uzis Esperanton ĉefe private por vojaĝi kaj korespondi.

Li korespondis i.a. kun rusoj kaj estonoj en Sovetunio, kun homoj el Ameriko, Ĉinio, Japanio.

Li vojaĝis al Jugoslavio, Greklando, Bulgario, Ĉeĥoslovakio, Pollando. En Bulgario, li parolis ankaŭ ĉe kluba kunveno, kie ili demandis lian opinion pri la Eŭropa Bazar.

Li helpis ankoraŭ, antaŭ la falo de la muro, por kolekti monon por bulgara esperantisto kiu bezonis operacion de okulo, en Antverpeno.

Foje estis pli malrekta helpo : juna bulgarino ricevis adresojn de franclingvaj belgoj, do de li, kaj ŝi skribis france. Ŝi ja lernis la francan ĉar tio estis parto de la kursoj por iĝi poŝtoficisto. Ŝi petis lian helpon por enskribi sin al lernejo, kaj poste por edziĝi al belgo... Vidu kiom utila estas Esperanto !

Bernard Régis

